Tradicia poŝto: Mill Farm House, Bedfield, Suffolk IP13 7EA

malsupereco, en nekapablo efike respondi, aŭdigi siajn argumentojn." (*Journal du Dimanche*, 14 dec. 1997).

• **Esperanto ĉe Livemocha**

Jam la 2an de februaro 2009, Neil Blonstein (Nov-Jorko) atentigis pri voĉdonebleco por Esperanto ĉe la usona retejo por lingvolernado 'Livemocha' ([www.livemocha.com](http://www.livemocha.com)). Kun kvar

milionoj da membroj, Livemocha estas la plej granda komunumo por lingvolernado en la mondo – ĝi proponas senpagajn diversnivelaĵajn kursojn por 95 lingvoj. Rapide kreskis la nombro de voĉdonoj. Iom post iom arigiĝis skipo da bonvolemuoj ĉirkaŭ Emilio Cid (Brazilo) por pretigi Esperanto-kurson.

Laŭ informo de Aloísio Sartorato (Rio-de-Janeiro),

Livemocha de nun disponigas al sia klientaro kursojn de Esperanto en pluraj niveloj.

Gratulojn kaj dankegon al ĉiuj kontribuintoj al tiu sukceso.

#### • 'Entrepreno Esperanto'

'Entreprise Esperanto' estas asocio por la disvastigo de eŭropa lingvo de interŝanĝoj. Bela 4-paĝa franclingva faldfolio pri ĝi elŝuteblas sub la titolo *Franchir rapidement la barrière des langues* (Rapide transiri la lingvan barilon): [www.bretagne-international.com/IMG/pdf/ESPERANTO-2.pdf](http://www.bretagne-international.com/IMG/pdf/ESPERANTO-2.pdf) (Mallongigita ligilo: <http://minilien.fr/a0les2> — klaku sur "VOIR LA BROCHURE" — Vidi la broŝuron). Entreprise Esperanto kunlaboras kun Linguaforce ([www.linguaforce.com/francais](http://www.linguaforce.com/francais)), entrepreno de tradukado kaj (profesia) klerigo. La du entreprenoj havas sian sidejon en Ile-et-Vilane, Bretonio. (Samteme, vidu ankaŭ: 'Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado': [www.ipernity.com/blog/32119/227259](http://www.ipernity.com/blog/32119/227259).)

#### • 'Afablaj sed firmaj' francoj

La 17an de januaro la eksĉefministro de Francio, Jean-Pierre Raffarin, speciala sendito de prezidanto Nicolas Sarkozy por franclingvio, venis Bruselen por premi favore al pli bona lingva ekvilibro en la institucioj de EU. Laŭdire, Francio estos "afabla sed firma". Li klarigis, ke multlingv-

### Cloth bag design

Not many people sent in ideas, but thank you. The publicity and information team is looking at them, alongside proposals for a new style for all our information publications. It's been promised for the congress in Llandudno, so there's a deal to be done in a short time. Watch this space!



#### • Per sonorilejoj de facila vento

Kelkaj artoj estas aparte anglaj, ekzemple la Moris-dancado. Alia, ne ofte vidata sed preskaŭ ĉie aŭdebla, estas la ŝanĝsonorigado. Nenia sono povas esti pli angla ol la matematika muziko el niaj preĝejaj turoj. En la internacia mondo, kiu estas Esperanto, oni malofte trovas ŝanĝsonorilistojn, sed kelkaj ja ekzistas, kaj du el ili, Terry Page kaj Roy Threadgold, partoprenis speciale aranĝitan 45-minutan sonorigon por festi la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenof. La nesperantistaj sonorilistoj ege interesiĝis pri la kialo kaj ĝoje konsentis kunsonorigi. La okazon ĉiuj ĝuegis, kaj la sonorigado estis elstara.

Raporto aperis en la sonorilista gazeto *Ringing World*, kune kun informoj pri Esperanto. La supra bildo montras (de maldekstre): Alistair, Peter, Tim, Marian, Terry, Cherry, Roy, Caroline.

ismo havas gravajn geopolitikajn efikojn por Eŭropo, ĉar ĝi prezentiĝas kiel G2-alternativo inter Ĉinio kaj Usono. Laŭ s-ro Raffarin, la unuigita francparolantaro de Eŭropo kaj Afriko havas ludotan strategian rolon en tiu direkto.

#### • Senpage elŝuteblaj libroj

La albumo 'E-Librejo' de Mike59 <[www.ipernity.com/blog/30614](http://www.ipernity.com/blog/30614)> ricevis 5 000 vizitojn ĝis la 23a de oktobro 2009. Tie 370 verkoj estas senpage elŝuteblaj. Vidu ankaŭ la blogon de Zhang Xuesong, Ĉinio, kiu ebligas aliron al pli ol 500 elektronikaj libroj en Esperanto <[www.ipernity.com/blog/deodaro](http://www.ipernity.com/blog/deodaro)>.

#### • Saluton al Luton!

The *Daily Express* published a few short words on Esperanto on the occasion of Zamenhof's 150th

anniversary, amongst other information on language. It ended with the statement that 'Saluton' may be colloquially abbreviated to 'Luton'!

#### • Ĉu unikoden?

Nun, escepte per malnovaj komputiloj kun malnovaj mastrumaj sistemoj, eblas skribi kaj aperigi tute normale la ĉapelitajn literojn de Esperanto (vidu <<http://eo.wikipedia.org/wiki/Unikodo>>), specialajn literojn de latinaj alfabetoj, aliajn alfabetojn kaj aliajn skrib-sistemojn, inkluzive de la araba, ĉina kaj tiel plu.

Por mastrumaj sistemoj Vindozo 95/98/ME kaj Vindozo NT4/2000/XP/Vista ekzistas nova versio de 'Esperanto-Klavaro' (EK), kiun faris Jurij Finkel en Rusio ([www.esperanto.mv.ru/Ek/index](http://www.esperanto.mv.ru/Ek/index)).

## MALLONGE

Por Mac OS X, Philippe Berizzi kreis programon por AZERTY-klavaro (franca), kiu estas elŝutebla ĉe [www.linguaforce.com/klavaro.htm](http://www.linguaforce.com/klavaro.htm)

Estas notinde, ke problemoj plue ekzistas kun Yahoo, kiu ankoraŭ rifuzas alpreni la normon Unicode UTF-8.

Tamen, oni interkonsentu aŭ nepre uzu la x-sistemon por supersignoj Esperantaj, se oni sendas pure Esperantan tekston por aperigo en gazeto aŭ simile, ĉar en tia okazo necesos re-formatigi la tekston aliprograme.

• **Franclingva informfontego**  
Reaktualigita, reviziita kaj riĉigita estas nun la dokumento 'L'espéranto au présent' (Eo nuntempe) konsultebla ĉe: [www.ipernity.com/blog/32119/211524](http://www.ipernity.com/blog/32119/211524). Temas pri plej diversaj faktoj pri la nuna stato de Esperanto en la mondo.

Kvankam ĝi estas en la franca, iu ajn povas profiti el ĝi kaj el ĝiaj multegaj ligiloj. Rimarkoj por plibonigi tiun materialon estos bonvenaj. Eblas laŭvole adapti tiun materialon por informadi.

• **Nova originala romano pri britaj esperantistoj**  
La romano *Vojaĝo al kuniĝo*, ĵus aperinta, havas intrigon, kiu disvolviĝas parte en Esperantujo, kaj grandaparte en Britio. La

*La 15an de decembro en ĉeesto de ĉirkaŭ 70 homoj oni inaŭguris Zamenhof-monumenton en Herzberg am Harz, 'la Esperantourbo'. Prof. John Wells ĉeestis la inaŭguron kiel Prezidanto de EAB kaj salutis nome de la britaj esperantistoj la urbestron kaj ĉeestantajjn gastojn. Li ankaŭ gratulis pri la projekto 'Comenius' (Komenio), per kio renkontiĝas infanoj de Britio, Germanio kaj Hungario. John krome partoprenis en kantado ĉe maljunulejo.*

• **Prezidanton de Eŭropa Parlamento renkontis EEU en Bruselo**  
EU-deputitino Małgorzata Handzlik aranĝis, ke delegacio de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) je la 13a de januaro renkontu la Prezidanton de Eŭropa Parlamento, Jerzy Buzek, eksĉefministro de Pollando. Ĉeestis ankaŭ Jozef Reinvar, vic-ambasadoro de Slovakio en Belgio, kaj Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU.

Seán altiris la atenton al la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, ekzemple de la projekto Lingvolanĉilo en Britio, kaj proponis rolon por Esperanto por plibonigi lingvolernadon kaj plifortigi tuteŭropan identecon. La Prezidanto montris grandan intereson kaj alte taksis la politikan realismon de EEU, kaj la fakton, ke ĝi celas realan, eĉ se unue modestan rolon por Esperanto en la kunteksto de la multlingva Eŭropo.

(Laŭ revuo *Esperanto* de UEA, marto)

romano estas originale verkita en Esperanto de Darik Otira, nova kaj ankoraŭ nekonata aŭtoro.

Esperanto ne estas la ĉefa temo de la romano. Priskribo de la libro, kiu jam aperis rete ĉe kelkaj libroservoj, avertas, ke la "eksplicitaj priskriboj de seksumado ŝokos kelkajn legantojn, sed ili ne estas senmotivaj en romano, kies ĉefaj temoj estas sekso kaj pornografio".

Konsidere tion, ne estas surprize, ke neniu vera persono aperas en la romano, kaj eĉ la urboj ŝajnas fikciaj, sed la landoj ne estas inventitaj. Krom kelkaj vojaĝoj, interalie al Esperanto-kongresoj, la intrigo disvolviĝas komence en Britio, poste en Germanio, kaj ree en Britio.

La romano estas eldonita de Mondial.

*Daŭrigo sur paĝo 24*



# El la librovendejo de EAB:

## • Second-hand books – Brokantaj libroj

Prices of second-hand book include p. & p. HB = hardback / bindita, SB = softback / broŝurita. Cheques payable to 'EAB'. You may make phone purchases using your debit/credit card: tel. 0845 230 1887.

- EAB cannot stock all titles, but can order items, for which you pay EAB in sterling. The UEA catalogue is at <http://katalogo.uea.org>.
- A selection of second-hand books is also available from librarian Geoffrey King: [www.biblbut.org/html/brokante](http://www.biblbut.org/html/brokante).

### ON THE ESPERANTO MOVEMENT

*La Bona Lingvo* Claude Piron. Vieno/Budapeŝto: Pro Esperanto/HEA, 1989. SB, 111 p. 'Pri la Bona Lingvo mi babilos kun vi, se vi konsentos.' Elokventa pledo por la riceĉo de la parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj. £2.80 (momente nehavebla de UEA).

*La danĝera lingvo* Ulrich Lins. Gerlingen: Bleicher, 1988 (1a eld.). 568 p. HB. Dokumentita historio pri la persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en cara Ruslando, orienta Azio kaj Ligo de Nacioj. £7.00 (price at UEA 21 euros new).

*Jubileo – Jarcento de Esperanto*. Diversaj aŭtoroj. Roterdamo: UEA, 1988. 162 p. SB. Belaspekta kolekto da artikoloj, raportoj kaj fotoj el la centjarigo. £2.50

### POETRY

*Meznokto metropola* Krys Ungar. Antverpeno: FEL, 1991. SB, 111 p. Originala poemaro. Multaj gajnis apartan premion en Belartaj Konkursoj de UEA. £1.70

*Libro de amo* Peter Peneter, Georgo Peterido Peneter. Byblos, 1969. SB, 262 p. Enhavas la faman amoran poem-ciklon *Sekretaj sonetoj* (1931) kaj similtajn poemojn, originalajn kaj tradukitajn por instruo kaj instigo. £2.50

*Nur tri kolorojn* Eli Urbanová. La Laguna: Stafeto, 1960. SB, 139 p. Pasia originala poemaro. £1.70.

*Pinta kraĵono* Reto Rossetti. La Laguna: J. Régulo-Stafeto, 1959. SB, 128 p. Seriozaj poemoj, spritajoj, parodioj, kaj versa historio de la Esperanto-movado. £1.80

*La sonetoj* W. Shakespeare. El la angla tradukis W. Auld. Pisa: Edistudio, 1981. HB, 325 p. Dulingve: angla kaj Esperanta tekstoj aperas unu kontraŭ la alia. £5.70

### PROSE FICTION

*Erik aŭ La malgranda insektlibro* Godfried Bomans. Tradukita el la nederlando fare de Eo-Klubo Purmerend. Nederlando, 1992. SB, 150 p. Pensinstiga libro. £3.00

*La faraono* Vol. 1, 2 kaj 3. B. Prus. El la pola tradukis Kabe. Varsovio: 1957. 3 x HB. La fama romano. £9.40.

*La mirinda eliksiro* Johan Hammond Rosbach. Åbyhøj: Dana Eo-Eldonejo, 1968. SB, 98p. Dek kvar originalaj noveloj. £1.80

*Sep krimnoveloj* Ronald Cecil Gates. Aŭstralio: AEA, 1993. 84 p. Originale verkita Esperantlingve. £1.90.

*Ŝipestro rakontas* F.T. Lundquist. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1962. HB, 72 p. £1.50

*Vivi estas danĝere* I. Nemere. Budapeŝto: HEA, 1988. SB, 158 p. Streĉa spionromano en simpla, glata lingvaĵo. £1.75

### BIOGRAPHY




*Vivo de Gandhi* Edmond Privat. La Laguna: J. Régulo-Stafeto, 1967. SB, 159 p. Originala Esperanta verko. £1.80

### ESPERANTO LANGUAGE

*Lingvo stilo formo* Kálmán Kalocsay. Hiroŝimo: Librejo Pirata, 1970. SB, 160p. Studoj pri vortfarado. £1.50

### SCIENCE FICTION


*Malfacilas esti dio* Arkadij kaj Boris Strugackij. Tradukis A. Juravljov. Moskvo: Impeto, 1992. SB, 168 p. En obskura mezepoko sur fora planedo, Don Reba strebas instali faŝisman reĝimon. £1.70



## • **Newly arrived – Nove alvenintaj**

For new book, please add 15% for p. & p.. Cheques payable to 'EAB'. For other details, please see opposite.

**Antigona** Jean Anouilh. Tradukis R. Imbert. Teatraĵo. Ĝurĉevac: Grafokom, 2009. 67 p. Kvankam inspirita de la samtitola tragedio de Sofoklo, la dramo de Anouilh, verkita dum la Dua Mondmilito, aludas al historiaj eventoj pli proksimaj al nia tempo. **£9.15**



**Beletra Almanako 5 (junio 2009).** \*NOVA\* Red. J. Camacho, P. Dasgupto, I.Ertl. Novjorko: Mondial, 2009. 176 p., 22 cm, ilus. Originala kaj tradukita prozo, poezio, eseoj kaj recenzoj. **£9.30**

**Beletra Almanako 6 (oktobro 2009)** \*NOVA\* 171 p., ilus. Enhavas ankaŭ la premiitajn tekstojn el la Belartaj Konkursoj de UEA de 2009. **£9.30**

**Bibliografio de tradukoj el la angla lingvo** W. Auld kaj E. Grimley Evans. Dollar: 1996. 53 p. Laŭintence kompleta listo, ĝis 1996, de beletraj esperantigoj el la angla, plus el alilingvaj literaturoj de Britio kaj Irlando. **£4.20**

**Elektitaj paroladoj kaj prelegoj** \*NOVA\* Ivo Lapenna. Roterdamo: UEA, 2009. 166 p., 21 cm. Pri Esperanto, ĝia komunumo, kaj aspektoj de nia lingvo kaj kulturo. **£8.80**

**Esperanto-Cwrs (Esperanto Mini-Course** por kimralingvanoj). Barlaston: EAB, 2010. 36 p., 15 cm. Kompakta serio de dek lecionoj, surbaze de la populara lernolibro *Esperanto for Beginners* de Montague Butler. **£1.50**

**The Esperanto Language** Frank Nuessel. Ottawa: Legas, 2000. 153 p., 23 cm. Chapters include 'The Esperanto Language', 'A Zamenhof biography', 'The Esperanto Movement'. By a language professor at Louisville University. **£25.40**

**La Esperanto-vortokonsisto** Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 2006. 113 p., 20 cm. Profunda lingvistika analizo kun multaj ekzemploj, verke de la prezidanto de Akademio de Esperanto. **£9.20**

**Krias la silento** István Nemere. Berkley: Bero, 2002. 177 p., 21 cm. Psikologia romano pri sukceshava ĵurnalista kaj lia handikapita filo. **£15.00**

**La lando de blinduloj** H.G. Wells. Elangligis E.W. Amos. Roterdamo: UEA, 2006 (2a eld.). 26 p., 21 cm. Esploristo hazarde trovas komunumon de blinduloj, kaj memoras la proverbon 'Inter la blinduloj reĝas la strabuloj' ..., sed okazaĵoj ne tiel iras ... **£2.73**

**Lingvistikaj aspektoj de Esperanto** John C. Wells. Roterdamo: UEA/CED, 1989 (2a eld.). 76 p. 23 cm. Scienca prezento, populare verkita, de la trajtoj de la lingvo Esperanto kompare kun la aliaj lingvoj de la mondo. **£5.10**

**Origino de specioj** \*NOVA\* Charles Darwin. Elangligis el la 1a eld. (1859) Klivo Lendon. Antverpeno: FEL, 2009. 431 p., 21cm. La mondfama *On the Origin of Species* – fundamento de evolua biologio. **£20.30**

**Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj** \*NOVA\* Lidia Zamenhof. Antverpeno: FEL, 2008. 429 p., 21 cm. Eseoj, artikoloj, paroladoj, rakontoj kaj leteroj. **£20.30**


**La tero kiu volis forflugi** D. Sencenko kaj A. Striganova. Moskvo: Impeto, 2009. 110 p. Prozo originala. Du fikciaj, filozofiaj noveloj, kiuj pensigas kaj revigas. **£8.65**

### OTHER ITEMS

**Stickers Havano** \*NEW\* A sheet of 12 stickers/stamps featuring the logo of the 95th Universal Congress. **£1.20**

**Vortludoj kaj luda komunikado en Esperanto** \*NEW\* A.S. Melnikov. San Marino: AIS, 2008. 224 p., 21cm. A study and anthology of wordplay in Esperanto. **£13.40**

**JomArtaĵoj. La ruĝa albumo.** Stockholm: Studio Jomart, 2009. CD with 12 'folkloresque' songs by the couple Jomart kaj Natasa, with Carina. **£20.50**



*Daŭrigo el paĝo 21*

• **Local broadcasts on the 150th anniversary of Zamenhof's birth**  
Radio Jersey broadcast five minutes on Esperanto with David Kelso. It covered 'the usual stuff': how many speak it, isn't English already ..., etc., but friendly enough. It is believed that a report was also done on BBC Radio Suffolk (no details received), and BBC Radio Devon was also interested; it is not known if this went ahead.

• **BBC online article leads to piece in North Wales press**  
Hilary Chapman managed to get an article on the BBC Wales website (errors not his fault!): [http://news.bbc.co.uk/1/hi/wales/north\\_west/8376794.stm](http://news.bbc.co.uk/1/hi/wales/north_west/8376794.stm). This led to his being rung up for an interview for his local press, the North Wales *Weekly News*. This was entitled 'Pick up a new language in 2010 – Esperanto

lessons to be launched in May', which appeared on 7 January with a portrait. The useful piece ended with EAB's web address.

• **Voĉdonu por Esperantaj literoj en poŝtelefonoj!**  
Lastinforme, la propono por aldoni supersignitajn literojn de Esperanto en la programon Android ricevis 768 voĉojn.

Por voĉdoni, simple alklaku la kvinpintan, flavan/blankan stelon, maldekstre de la propono, apud 'Issue 1730: Add Esperanto characters' ĉe <http://code.google.com/p/android/issues/detail?id=1730>. Oni devas registriĝi por voĉdoni – simpla formalajo, sed iuj raportis, ke la steleto surklakenda tiel etas kaj fuŝvideblas, ke kelkaj ne vidis ĝin.

Estas aparte grave, ke Esperanto aperu. Tio estus utila precedento por samdirektaj klopodoj kaj projektoj ie ajn en la mondo: montri, ke Esperanto estas uzata kaj uzebla.

• **Miland Joshi en BBC-WM**  
Lin intervjuis Jimmy Franks por BBC-WM la 15an decembron pri Esperanto. La elsendo estis portempe aŭskultebla ankaŭ interrete; Miland havas ĉe si elektronikan kopion.

• **Scottish Esperanto Congress**  
Enclosed is a leaflet on the next Scottish Esperanto Congress. This year in Berwick-upon-Tweed from 4 to 7 June. See the leaflet for further details.

• **From Esperanto to oblivion**  
On 3 February, an article appeared in the *Wellington Weekly News* on the work of Sidney Edmund Bond (b. 1855) – one who moved from Esperanto to Ido, to Interlingua, then to his own project and oblivion. The long article ends with the phrase: "Esperanto has remained unchallenged as the pre-eminent planned international language."

• **Invito al fervojista Esperanto-kongreso en Bulgario**

Bulgaraj fervojistoj-esperantistoj invitas partopreni en la 62a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), de la 8a ĝis 15a de majo 2010 en Sofio. Informis s-ino Veselka Kamburova, retadreso: [veskam@abv.bg](mailto:veskam@abv.bg).

• **Poster for 'Zamenhof-Tago'**  
Brian Barker, on behalf of Esperanto Lobby, prepared a poster for 'Esperanto Day' on the 15 December last year – also Zamenhof's 150th birthday anniversary. The poster is available through the Esperanto Lobby website on [www.esperantolobby.net](http://www.esperantolobby.net).

• **Kampanjo por Esperanto en usonaj lernejoj**

Daŭras kampanjo 'Instruado de Esperanto en Usonaj Lernejoj'. Nova konkurso komenciĝos en januaro ĉe Change.org. Pasintjare ĝi atingis proksimume la 20an lokon el plurcent proponoj – kaj eble 100,000 homoj (neesperantistoj) devis atenti la fenomenon Esperanto. Kontaktulo estas Neil Blonstein ĉe la retadreso [neil\\_nachum@yahoo.com](mailto:neil_nachum@yahoo.com).

• **Internacia arta konkurso itala por geknaboj de la mondo**

Triesta Esperanto-Asocio lanĉis la 4an Internacian Konkurson por Geknaboj – pri Kristnasko 2010. Ĉiun konkursaĵon oni prezentos al publiko. La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el tri kategorioj, kiuj aldoniĝos al la poentoj de la jurio.

Oni anoncos premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]).

Kat.1: Desegnaĵo; Kat.2: Rakonto aŭ poeziaĵo; Kat.3: Manfaritaĵo. Oni atendas artaĵojn de geknaboj el la tuta mondo. Sendu ĝis la 15a de nov. 2010 al: Elda Doerfler, Triesta Esperanto-Asocio, Via del Coroneo 15,



**"Ne necesas skulptaĵo en domo, kiu havas katon."**  
Wesley Bates

Misteroj, liberecmaĵ, saĝaj, brejaj kaj fascinoj. Tiaj estas katoj. Se vi samopinias, vi estas bona kandidato por nia ron... ron... rondo. Jes ja, Esperantista Kat-amikaro ekzistas por kunigi ĉiujn verdajn katatantojn, sendepende de tio, ĉu ili mem posedas katon aŭ ne. Sufiĉas admiri kaj adori ĝin.

Rondo "Kato"/Esperantista Kat-amikaro estas faka asocio kunlaboranta kun UEA. Nia prezidantino estas Majorie Boulton. Nia organeto *Foljoj de Kat-amikaro* (3-folje jare) abunde raportas pri la kato vivo. Jaso alĝo kostas 7 pundojn. Nia UEA-konto: [ria-u-t](mailto:ria-u-t).

[rondokato@hotmail.com](mailto:rondokato@hotmail.com)



IT-34133 Trieste, Italio; rete:  
testudo.ts@gmail.com aŭ noredv  
@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.it.

• **Esperanto-kulturo ĉe OSIEK**

La regula internacia konferenco OSIEK (17–23 jul 2010) okazos en Herzberg, Germanio, kun multaj prelegoj. La ĉeftemo estas 'Kial Esperanto estas revolucia lingvo?' Pliaj informoj troveblas ĉe <http://esperanto-urbo.de>.

• **Nova retgazeto el Litovio**

Ekde oktobro 2008 Antanas Grincevicius, esperantisto el Vilno, iniciatis laŭdire altnivelan, retgazeton *Barelo* pri aktualaj temoj litoviaj, legeblan ĉe <http://barelo.blogspot.com/>. Esperantaj temoj tie ne fremdas

• **E-libroj en Esperanto**

'E-libroj', aŭ elektronikaj libroj, komencas populariĝi ankaŭ en Esperantujo. Flandra Esperanto-Ligo (FEL), kiu jam delonge proponas siajn e-librojn al la publiko, kaj la gazeto *La Ondo de Esperanto*, ĵus kreis apartan dissendoliston por interesatoj. Kiu volas aliĝi, tiu sendu retmesaĝon al: [mailserver@fel.esperanto.be](mailto:mailserver@fel.esperanto.be). En la temlinio troviĝu la jena ordono: subscribe novaj\_e-libroj. La korpo de la mesaĝo restu malplena. Se restus demandoj, vi povas retskribi al: [e-libroj@fel.esperanto.be](mailto:e-libroj@fel.esperanto.be). □

**New Members of EAB**

Joseph Biddulph, Pontypridd  
C.G. Brierley, Blackpool  
Jim McNeill, West Yorkshire  
Alan Richardson, Leicester

**Deceased Members**

Ken Alexander, Rugeley  
Kathleen Hand, Liverpool  
Alwyn Kind, Shrewsbury

**Completed the  
Free Postal Course**

Michael Eames, Lancaster  
Carys Goldy, Dunkeld

• **English as she is spoke**

"Can't you speak English?" "Yes! I am!!" The British Council clearly still has a lot of work to do! After the course, there will be grilled chicken ass with fresh herpes. Never mind, all the water has been passed by the manager. But look out for the erection in progress! And don't die outside, it's strictly prohibited here.



# JEB daŭre pli viglas

[www.jeb.org.uk](http://www.jeb.org.uk)

Kiam alproksimiĝis nova jaro JEBanoj vojaĝis eksterlanden por bonvenigi la jaron 2010 en Esperantaj ĉirkaŭaĵoj.

## Vojaĝemo

Guy pasigis la silvestran periodon en la pola urbo Zakopane, okaze de la unua Junulara Esperanto-Semajno (JES). JES naskiĝis post la kunigo de la longdaŭra Internacia Seminario, 52-jaraĝa antaŭ ĝia foriĝo, kaj la multe pli juna Ago-Semajno, por ke partoprenantoj ne plu devu elekti inter kiu amikaro pasigi tempon dum la jarŝanĝiĝo.

JES ne estas la sola nov-alveninto. La urbo Saarbrücken gastigis la Novjaran Renkontiĝon, familian eventon, kiun ĉeestis multe da homoj. Tio ja okazas dum jaroj, sed ĉi-foje okazis samtempe la Novjara Internacia Semajno, por anstataŭi la forpasintan Ison dum tiuj jaroj, kiam la JES okazas ekster Germanio. Tim, Clare kaj Thomas decidis iri, kune kun la familio Grimley Evans, vojaĝante per Eurostar. Konstateble la tagoj antaŭ la forirdato estis sufiĉe maltrankviligaj, pro la Kristnaska ĥaoso kiu detruis la jarperiodon por tiom da vojaĝantoj. Bonsorte ĉio iris

glate kiam ni alvenis al la stacidomo, do la unua problemo malaperis.

Reveninte nelonge hejmen, Tim kaj Clare devis prepariĝi por la 5-a Drono ĉe Wedgwood Memorial College. Pri tio mi jam verkis artikolon aperantan en *EAB Update*, do mi diru sole, ke ni ege ĝuis la semajnfinojn kaj sen ajna dubo partoprenos denove baldaŭ.

## Disbatis partoprenan rekordon

Ĉiuj lastaj aferoj temas pri unuopaj agoj, kaj ne vere JEB-agado. Tamen ne miskredu, ke JEB dormis ekde la unua raporto, ĉar aferoj male pasis. Komence de februaro okazis la JEBA vintra renkontiĝo, ĉi-foje en bela Cardiff. Estas granda plezuro povi rakonti, ke ni disbatis la partoprenantaran rekordon, kiun ni rompis okaze de la aŭtuna renkontiĝo, kiam 14 homoj ĉeestis. En Cardiff estis 22 JEBanoj (aŭ honoraj membroj, kiuj superis la oficialan aĝlimon).

Aparte plaĉe estas tio, ke kelkaj novuloj venis al la renkontiĝo. Iujn ni konas ekde iam pere de la JEB-forumoj, sed du estis tute novaj; unu el ili (Amelia) baldaŭ transvojaĝos Germanion pere de Pasporta Servo.

Tiu ne estis sole la plej populara renkontiĝo en la lastatempa historio de JEB, sed ankaŭ la plej pozitiva, pro tio, ke Heather Eason sperte organizis gvidpromenon tra la urbo. Ni esperas imiti tiun ideon venonte, sed kie okazigi renkontiĝojn ankoraŭ diskutendas. Raporto de Paul Roberts pri la semajnfino troviĝas ĉe [tinyurl.com/yj4x8yo](http://tinyurl.com/yj4x8yo), de la BBC ĉe [tinyurl.com/y9uprev](http://tinyurl.com/y9uprev), kaj fotoj ĉe [tinyurl.com/yajegva](http://tinyurl.com/yajegva).

Do, kvankam tiu raporto ja estas mallonga, oni ne trompu sin, ke nenio okazis. Laŭdire multe da JEBanoj videblos ĉe la Brita Kongreso de Esperanto en Llandudno, do vi kapablos mem konstati, ke la junulara sekcio de la landa asocio ja daŭre pli viglas.

Tim Owen

**TEJO transprenas la retprojekton 'Monda kalendaro'** ([www.mondakalendaro.org](http://www.mondakalendaro.org)) kaj volas plilarĝigi ĝian amplekson: Esperanto kursoj en la mondo. Celo: ĉiu facile kaj rapide trovi fizikajn Esperanto-kursojn en sia proksimeco. Instruistoj povu enskribi siajn kursojn. Ĉu vi *interesiĝas kunlabori?* Kontaktu la TEJO-oficejon: [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org).

Sube: Ĉe la vintra renkontiĝo de Junularo Esperantista Brita, kie partoprenis 22 gejunuloj.



## Zamenhof-festo kaj venonta jubileo en Suda Londono



La 12an de decembro 2009 organizis la Sud-Londona Esperanto-Grupo (parto de la Sud-Orienta Esperanto-Federacio) Kristnaskan Feston kaj Naskiĝ-feston de d-ro Zamenhof, ĉe Unity Centre of South London en Balham. Dek kvin personoj partoprenis, kaj ni ĉiuj pasigis agrablan tempon. Al la aranĝo ni invitis kaj esperantistojn kaj neesperantistojn, por ke ni povu reklami la lingvon al aliaj – do ĉiuj estis bonvenaj. Kiel kutime, estis ne nur multe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, sed ankaŭ pluraj distraĵoj kaj specialaĵoj. Ni ankaŭ kunkantis kristnaskajn kantojn.

La festo de 2010 okazos la 11an de decembro, do bonvolu enskribi ĝin en vian taglibron, venu kaj alportu viajn amikojn!

*Grava anonco:* Ĉi-jare okazos la Arĝenta Jubileo de la Sud-Londona Esperanto-Grupo, kiu fondiĝis en 1985. Tial, dum la jaro ĝi intencas organizi plurajn specialajn eventojn por festi tion.

Jen kelkaj datoj por via taglibro, kaj aliaj aldoniĝos kiam aranĝotaj:

- *Paska Festo:* 10 aprilo 2010, ĉe Unity Centre, Balham.
- *Vizito al la Brita Muzeo:* julio aŭ

*Ĉe la Zamenhof-festo de la Sud-Londona Esperanto-Grupo*

aŭgusto (dato anoncota).

- *Piroteknika Vespero:* 6 nov. 2010.
- *Kristnaska Festo:* 11 dec. 2010.

Informis Gregory Porilo

## Venonta kunveno de Nord-Okcidenta Federacio, Preston

Niaj specialaj gastoj ĉe la venonta kunsido de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio estos Terry kaj Anica Page.

La aranĝo okazos la 17an de aprilo 2010 ĉe Empire Services Club, Hartington Road, Preston, ekde tagmezo ĝis la 5a horo posttagmeze. Dum la posttagmezo okazos bufeda tagmanĝo kaj sandviĉa paŭzo.

Por rezervi, bonvolu skribi viajn nomon, adreson kaj telefonnumeron kaj sendi ilin kun via ĉeko por £10.00 – pagenda al 'South Lancashire Esperanto Group' – al Andrew Wheatley, P.O. Box 103, Lytham St Annes, FY8 3GU; poŝtelefono 07543 301467.

Bonvolu ankaŭ diri al Andrew se vi estas vegetarano. Certigu, ke Andrew ricevu vian ĉekon antaŭ la 14a de aprilo 2010.

## Nekrologoj

**Ken Alexander**, naskita en 1913, forpasis pasintan aŭguston. Li estis dumviva membro de BEA/EAB. Ni alte taksas tiun vivlongan subtenon.


Mi unue konatiĝis kun li en la jaro 1957. Tiam mi estis freŝbakita esperantisto, ankoraŭ loĝanta ĉe miaj gepatroj. Mi biciklis al Rugeley por viziti Ken kaj lian edzinon Naomi.

Ekde 1960 mi loĝas en Londono. En tiu epoko estis tre multaj membroj de la Londona Esperanto-Klubo kiuj bone konis Ken kaj rakontis admire pri lia aktora talento, interalie en la 'pantomimo', kiun oni prezentis. En la historio de la klubo, *Londono vokas* (1978), aperis fotoj de li kaj la kunaktoroj.

John Wells

**Kathleen Hand (1910–2010)**, preskaŭ 100-jaraĝa, forpasis trankvile la 13an de januaro. Funebraĵo okazis en Liverpolo la 22an de januaro. Familianoj kaj reprezentantoj de ĉiuj interesoj de Kathleen estis inter la preskaŭ kvardek ĉeestantoj, inter kiuj Esperanto. Ĉeestis lokaj esperantistoj John Evans, al kiu Kathleen instruis Esperanton, kaj Ian Mac Dowall, kiun Kathleen siatempe multe helpis restarigi la Esperanto-Grupon de Wirral.

Kathleen, mirinda kaj talenta virino, lasis ĉe konatoj feliĉajn memorojn. Pli da informoj pri Kathleen legeblas en *EAB Update* n-ro 45, p. 23. Aperis anonco en *Liverpool Echo* la 15an de januaro.



Ĝus eldonita! Ĝisdatiĝu per

John C. Wells

## English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studentoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto

Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio:

ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvi + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: [www.librejo.com/wells-vortaro](http://www.librejo.com/wells-vortaro).

- *Vendoprezoj ĉe EAB*: £15 (broŝurita) kaj £29 (bindita), plus sendokostoj je 15%. Reta butikoj: [www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary](http://www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary) – aŭ telefonu al 0845 230 1887.

### Stipendio por evoluigi novajn aŭtomatajn Esperanto-tradukilojn

La traduk-platforno Apertium, per kiu oni evoluigas aŭtomatajn tradukilojn el kaj al Esperanto, i.a. tiuj de <http://traduku.net/> estos plej verŝajne elektita kiel projekto ĝuanta stipendion de la Somero de Programado de Guglo (Google Summer of Code).

La Somero de Programado estas iniciato de Google, por instigi la evoluigon de liberaj programoj (t.e. senpage uzeblaj de ĉiuj kaj kun travebla programkodo, reuzebla kaj modifebla de kiu ajn).

Temas pri stipendioj por studentoj (ĉi-jare US\$5 000), kiuj dum tri monatoj laboru kun elektita projekto.

La antaŭviditaj projektoj en Apertium apartenas al du kategorioj: ĉefe programadaj aŭ ĉefe lingvistikaj.

En la lingvistikaj oni aldonas novajn lingvoparojn. (Malfermitan liston de projektoj eblas legi en la angla ĉe [http://wiki.apertium.org/wiki/Ideas\\_for\\_Google\\_Summer\\_of\\_Code](http://wiki.apertium.org/wiki/Ideas_for_Google_Summer_of_Code).)

Nuntempe ekzistas en Apertium 22 tradukiloj inter lingvoparoj konsiderataj "stabilaj" kaj pliajn en diversaj gradoj de evoluigo. El tiuj 22, tri havas Esperanton kiel unu el la du traduklingvoj: la tradukilo el la kataluna, la hispana kaj la angla (ĉi-lasta ankaŭ en la inversa direkto). Ankoraŭ ne atingis 'stabilan' nivelon tradukilo el la franca al Esperanto. (Listoj de lingvoparoj estas konsulteblaj ĉe [http://wiki.apertium.org/wiki/Main\\_Page](http://wiki.apertium.org/wiki/Main_Page) kaj ĉe <http://wiki.apertium.org/wiki/Incubator>.)

En la programadaj oni evoluigas la platformon aŭ adaptas por diverscela uzado.

Konoj pri Linukso aŭ simila UNIX-bazita sistemo (ekz. Mac), XML, ĝenerala programado kaj lingvistiko/gramatiko estas avantaĝo.

Kvankam la formala limdato estas la fino de marto, eblas aliĝi al la retgrupo de Esperanto-evoluigantoj de Apertium ĉe [http://groups.google.com/group/apertium\\_eo?hl=eo](http://groups.google.com/group/apertium_eo?hl=eo) kaj nepre al la tut-Apertiumaj kanaloj troveblaj ĉe <http://wiki.apertium.org/wiki/Contact>.

En la babilejo [#apertium](http://irc.freenode.net) ni pretas respondi al demandoj (la babilnomoj de la ĉefaj Esperanto-evoluigantoj estas 'jacobEo' kaj 'hector').

Apertium Esperanto: <http://www.apertium.org/?lang=eo>;  
[http://wiki.apertium.org/wiki/Main\\_Page](http://wiki.apertium.org/wiki/Main_Page); [http://wiki.apertium.org/wiki/Kiel\\_aldoni\\_novan\\_lingvan\\_duon](http://wiki.apertium.org/wiki/Kiel_aldoni_novan_lingvan_duon).

[www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)

*Festu jarfine kun ni!*

### La 27a Internacia Festivalo – via tradicia jarfina seminario

- La bavara mezepoka urbeto Nördlingen (denove) bonvenigas vin!
- Komforta domo, simpatiaj mastroj kaj bonaj manĝoj garantias etosoplenan restadon. La bele restaŭrita centro invitas al promenoj kaj senstreĉiĝo.
- Nia kleriga programo estas konata pro la abundaj kaj alkvalitaj ofertoj.
- Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein. Tel. 05624-8007; poŝtel. 0171-496 4558 aŭ vidu la supran retpaĝaron.

### Beneluxa kongreso – okaze de 50 jaroj de Beneluxo. Antverpeno, 13–16 majo 2010

Vizito al historiaj konstruaĵoj de Antverpeno; al la Eŭropa Parlamento, la malnova centro de Bruselo; eventuale vizito al Mechelen. Bicikla/busa ekskurso al Doel aŭ al la bela marurbo Oostende, poste al Bruĝo.

- La kotizo inkluzivas programon kaj lingvofestivalon, dancbalon kaj koncerton de Kapriol, promenon kun Esperanto-parolanta arkitektino, diversajn prelegojn: '50 jaroj de Beneluxo' (Marc Cuffez), 'Movado sen Nomo', 'Esperanto kiel defendilo de regionaj lingvoj' (István Ertl), 'Interkultura Psikologio' (Adam Kiss).
- Necesas frue aliĝi. Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe: [www.esperanto.be/kongreso](http://www.esperanto.be/kongreso).